

Kiajn servojn la esperanto-instruado povos alporti al tiu
de la franca lingvo por franclingvaj gelernantoj, 8-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 653, 1976.04.14 & 17

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dediĉante nian atenton al la peresperanta instruado de la nacia lingvo, ni ne volas ne menciigi tre gravan eksperimenteton.

A.- En la zamenhofa jaro 1959 lica instruisto, veninta al manifestacio pri esperanto, entuziasmiĝis favore al nia idealo. Li nomiĝas Charles Ecabert. Jam en 1961 li sufiĉe lertis en la praktiko de esperanto por esti elektita prezidanto de la svisa organizaĵo Esperanto-Edukistaro de Svislando. Samjare li komencis eksperimenton kun konsenta lica klaso, kiu akceptis po unu horon pli semajne frekventi la lernejon profite al la studado de esperanto.

Cl.- Ekde la sesa instrumonato la gelernantoj kapablis elesperantigi tekstojn, kaj Charles Ecabert tradukigis al ili plej diversajn ekzercojn pri stilo. La gelernantoj tre ŝatis tiun ĉi manieron lerni la verkadon en la franca lingvo, kaj samtempe ili tre lertiĝis rilate al esperanto.

A.- Sed baldaŭ Charles Ecabert faris strangan konstaton, kiu maltrankviligis lin. Pluraj gelernantoj, kiuj antaŭe estis malbonaj en la verkado, troviĝis inter la plej kapablaj tradukantoj. Kontraŭe la gelernantoj, kiujn li ĉiam gratulis pro iliaj originaleco, poeta sento, nekutimaj priskriboj aŭ komparoj, malfacile adaptiĝis al la peresperanta instruado. Iliaj tekstoj estis inter la plej malfidelaj, ili kelkfoje apenaŭ respigulis la originalaĵon, kvankam la lernantoj bone komprenis esperanton.

Cl.- Okaze de kunsido de Esperanto-Edukistaro de Svislando ni aŭdis nian prezidanton raporti pri tiu ĉi stranga diferenco. Kaj tiam Charles Ecabert esprimis dubon, ke lia prijuĝo de la verkaĵoj estis eble ne objektiva.

A.- Por malkovri la veron Charles Ecabert reekzamenis la verkaĵojn de siaj gelernantoj, kaj lia maltrankvilo kreskis. Relegante tiujn ĉi tekstojn, li pli kaj pli konstatis, ke lia tiama juĝo estis ege subjektiva. Preskaŭ nur la poeziecon, originalecon li serĉis. Fakte la enhavo de tiuj ĉi tekstoj estis ege samnivela. Ĝenerale la gelernantoj ne havis multon por diri, ĉar la titolo superis ilian kompren-kapablon. Troviĝis kelkaj gelernantoj, kiuj tamen elturniĝis. Ili sciis, kion la instruisto atendas de ili : komparojn, poezion, priskribojn, portretojn. Eĉ se la titolo ne instigis al komparoj, poezio kaj portretoj, ili tion metis. Kaj la instruisto ilin gratulis per pozitiva rimarko kaj bona noto. La aliaj tekstoj sen komparoj, poezio, priskriboj kaj portretoj kompare ŝajnis sensignifaj.

Cl.- Kio fakte okazis. La juĝkriterio de la instruisto estis unuflanka, tute subjektiva.

A.- La peresperanta instruado subite malkovrigis al li, ke per la tradukado de taŭgaj tekstoj bone elektitaj, oni povas devigi la gelernantojn verki komparojn, transskribi poeziajn bildojn, fari priskribojn kaj pentri portretojn. Kaj ĝuste tiuj, kiuj antaŭe tion plej lerte faris, ne kapablis alfronti tiujn ĉi ekzercojn stilajn kun sukceso, kontraŭe al la gelernantoj, kiujn la instruisto antaŭe juĝis kiel malpli talentaj.

Cl.- Farante iom profundan analizon de la redaktaĵoj de siaj gelernantoj Charles Ecabert alvenis al la konvinko, ke la poetoj fakte estis infanoj, kiuj malprecize perceptis la realecon.

El tio la originalaj priskriboj, la nekutimaj vortoj, resume la originaleco. Kie normala infano uzis simplajn vortojn, la aliaj provis ĵongli kun vortaro, kiun ili ne regadis. El tio poezieco grandparte nekonscia. Plej ofte, kie la instruisto kredis malkovri poezion, fakte troviĝis nur malpli granda kapablo priskribi la realecon, ol ĉe la aliaj gelernantoj. Pro tio en la tradukado la rezultoj estis inversaj. La realistoj tuj kapablis adaptiĝi al la situacio. La laboron francigi tekston ili eĉ tre ŝatis. Fine ili sciis, kion skribi, kaj tion ili provis fari kiel eble plej fidele, montrante, ke ili bone perceptis la kaptilojn stilajn kaj la nuancojn leksikajn.

A.- Kontraŭe la pseŭdopoetoj malfacile kapablis trovi franclingvajn ekvivalentojn al la diraĵoj de la originala teksto, kvankam ili bone komprenis esperanton. Ili malkovrigis, ke ilia regado de la franca leksiko kaj stilo estis tre supraĵa.

Cl.- Ĵus antaŭ sia morto Charles Ecabert prelegis pri la instruado de la verkado. Li tiam asertis, ke helpe de esperanto tiu ĉi instruado fariĝus objektiva kaj scienca. La kolegoj miregis, ke latinisto povas diri tiun ĉi herezaĵon. Ĉu tradukado el artefarita lingvo povas eĉ ekzisti! - mokis unu el ili. Bedaŭrinde akcidenta morto malpermesis al Charles Ecabert respondi per nova kaj science plialtnivele planita instru-eksperimento. Kiu transprenos la torĉon ? Ni daŭre atendas !

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!